

Postparolo

Franz-Georg Rössler (R.) studis muzikteorion kaj komponadon ĉe Hans Vogt. Li verkis dokumentaron, artikolojn kaj broŝurojn pri li. Pere de Vogt la Asocio por Nova muziko Mannheim mendis ĉe R. la komponadon de nova ĥorverko, kion tiu plenumis per la peco "Evoluo" en la lingvo Esperanto. La verko gajnis la unuan premion dum la Germana ĥorkonkurso en 1993.

R., organisto, petis de la iama profesoro pecon por sia instru-

Kanon zu 3 (Hans Vogt)

Andante
(gleiches Maaß)

Orgel

(gleiches Maaß)

Adreso de la aŭtoro

Franz-Georg RÖSSLER
Am Mönchsbusch 6
DE – 67373 Dudenhofen / GERMANUJO
<rozsas@web.de>

Priaŭtoro informo

La aŭtoro naskiĝis en 1949, estas instruisto pri muziko kaj geografio. Komponas, verkas, prelegas.

mento. Vogt, mem ne organisto, hezitis, ĉar li sentis sin nekompetenta por tiu ĉi muzikilo. Bedaŭrinde li mortis en 1992 sen transdono aŭ plia mencio de orgenopeco.

Post monato tamen atingis R. koverto kun du orgenomuzikaĵoj. La filo de Vogt skribis, ke li sur la piano de la patro trovis tiujn verketojn, inter ili (la apudan) "Kanono je 3", evidente por R. faritajn. Laŭ la datoj ili ŝajnas esti la lastaj finitaj komponaĵoj de la komponisto – vera saluto trans la morton.

Ĉu Turkoj povas lerni Esperanton?

– Akordo en la simpla determinita substantivo de 6 hindeŭropaj lingvoj laŭ turka vidpunkto –

Gerald TUCKER

Pritraktinte la adjektivon kaj artikolon de ses hindeŭropaj lingvoj el la vidpunkto de nehindeŭropa (turka) lernonto en ĉefe paradigma maniero, ni nun aliros sintagmon: la determinitan substantivon.

La sintagmo* estos limigita al la tri ĝis nun prilaboritaj kaj supre menciitaj unuoj, kvankam la substantivo estas determinata de pluaj unuoj, ekz. posesivaj adjektivoj. Tamen, ĉi tiuj apartenas al sufiĉe komplika fenomeno poste prezentota en konekso kun la turka genitiv-posesivo. La tri elementoj tamen sufiĉas por demonstri la sintagmajn rilatojn* en la akordo inter la substantivo kaj ĝiaj determinantoj adjektivo kaj artikolo. Limiginte la pritraktotan sintagmon al la tri elementoj **substantivo** kaj la determinantoj **artikolo kaj adjektivo**, ni povas alpaŝi la interlingvan komparon.

Elirante, kiel ĉiam en ĉi tiu studo, de la turka lingvo, ni konstata la strukturon de la sintagmoj de la unuopaj lingvoj. Unue pritraktiĝos nur la *epiteta* adjektivo singulara.

Kun la escepto de la **rusa**, ĉiuj lingvoj de la studo havas po du sintagmojn de la determinita substantivo.

Pro tio ke la **turka** havas nur nedifinan kaj Esperanto nur difinan artikolon, nur unu sintagmo havas ĉiujn tri elementojn.

La vicordo de la elementoj de la turka determinita substantivo estas: (epiteta) adjektivo – (nedifina) artikolo – substantivo.

Paradigme la turka singulara epiteta determinita substantivo havas jenajn formojn:

* Notu: Pri la termino "sintagmo" kaj pri "paradigmaj kaj sintagmaj rilatoj" vd. Herbst / Stoll / Westermayr, "Terminologie der Sprachbeschreibung ein Lernwörterbuch für das Anglistikstudium", p. 21, 1991, Forum Sprache, Max Heuber Verlag, Ismaning

kazo	adjektivo	nedifina artikolo	substantivo
nominativo	büyük	bir	oğlan
genitivo	büyük	bir	oğlanın
dativo	büyük	bir	oğlana
akuzativo nedifinita	büyük	bir	oğlan
lokativo	büyük	bir	oğlanda
ablativo	büyük	bir	oğlandan
instrumentalo	büyük	bir	oğlanla

Ni observu ke nur la substantivo estas deklinaciita, dum la determinantoj restas senŝanĝaj.

kazo	adjektivo	difina artikolo	substantivo
nominativo	büyük		oğlan
genitivo	büyük		oğlanın
dativo	büyük		oğlana
akuzativo difinita	büyük		oğlanı
lokativo	büyük		oğlanda
ablativo	büyük		oğlandan
instrumentalo	büyük		oğlanla

Jen ni konstatas ke la loko por la difina artikolo vakas kaj ke la akuzativo difinita estas signita. Kiel supre, nur la substantivo estas deklinaciita, dum la determinanto(j) restas senŝanĝa(j).

La cellingva determinita substantivo kun artikolo kaj epite-ta adjektivo singulara

Transirante al la **angla** lingvo ni konstatas ŝanĝon en la vicordo de la sintagmo. Krome la nombro da kazoj reduktiĝas:

kazo	nedifina artikolo	adjektivo	substantivo
nominativo	<i>a</i>	<i>big</i>	<i>boy</i>
genitivo	<i>a</i>	<i>big</i>	<i>boy's</i>
prepozitivo	<i>a</i>	<i>big</i>	<i>boy</i>

Por turka lernanto la unualoka nedifina artikolo estas nova regulo, kiu tamen validas por ĉiuj el tiuj cellingvoj de la studo, kiuj disponas pri nedifina artikolo.

Ni konstatas en la paradigmo ke sole la genitivo estas signita, ĉar la angla havas laŭprincipe prepozitivan deklinacion. Kiel en la turka, la determinantoj restas senŝanĝaj.

Kontraŭe al la turka, la angla posedas difinan artikolon. Ankaŭ ĝi troviĝas je la komenco de la sintagmo, kaj tio estas la pozicio de la difina artikolo en ĉiuj cellingvoj kiuj disponas pri ĝi.

kazo	difina artikolo	adjektivo	substantivo
nominativo	<i>the</i>	<i>big</i>	<i>boy</i>
genitivo	<i>the</i>	<i>big</i>	<i>boy's</i>
prepozitivo	<i>the</i>	<i>big</i>	<i>boy</i>

Kiel supre la paradigmo enhavas nur signitan genitivan kaj senŝanĝajn determinantojn.

En **Esperanto** la turka lernanto trafas nekutiman situacion en ambaŭ paradigmoj. Ne nur mankas, kontraŭe al la turka, la nedifina artikolo. Ankaŭ tute nova por turko estas la signita nedifinita akuzativo – kun akordo. Tiu ĉi „redundanco“ estas tipa ankaŭ por la germana kaj rusa (v. tie). Kiel en la angla, la ceteraj kazoj estas prepozitivaj.

kazo	nedifina artikolo	adjektivo	substantivo
nominativo		granda	knabo
akuzativo		grandan	knabon
prepozitivo		granda	knabo

La dua nekutima situacion montriĝas en la paradigmo kun la difina artikolo:

kazo	difina artikolo	adjektivo	substantivo
nominativo	la	granda	knabo
akuzativo	la	grandan	knabon
prepozitivo	la	granda	knabo

Dum la turka ne havas difinan artikolon, Esperanto havas ĝin – sed laŭregule neŝanĝeblan. Oni observu, ke la resto de la paradigmo estas identa kun tiu de la (en Esperanto mankanta) nedifina.

Propedeŭtikan valoron por turka lernanto havas la senescepte laŭsistema deklinacio.

En ĉi tiuj ekzemploj la adjektivo *büyük/big/granda(n)* estas uzata nur en la konkreta (ĉi tie: fizika) senco.

La **franca** uzado en tiu senco necesigas denovan korekton de la vicordo, donante al la adjektivo postsubstantivan pozicion. La kazosistemo estas duala: nominativo kaj prepozitivo.

kazo	nedifina artikolo	substantivo	adjektivo
nominativo	<i>un</i>	<i>garçon</i>	<i>grand</i>
prepozitivo	<i>un</i>	<i>garçon</i>	<i>grand</i>

Konstateble, la paradigmo estas tutamplekse identa pro la prepozitiva strukturo de la deklinacio. Simile estas ĉe la tabelo kun la difina artikolo:

kazo	difina artikolo	substantivo	adjektivo
nominativo	<i>le</i>	<i>garçon</i>	<i>grand</i>
prepozitivo	<i>le</i>	<i>garçon</i>	<i>grand</i>

La granda diferenco kompare kun la ĝis nun pritrakitaj lingvoj estas, ke en la franca la difina artikolo kaj la adjektivo dependas de la genro de la substantivo. La supra substantivo estas vira, la suba ina. (*Komparu: Tucker, SR 3/2009, p. 181*)

kazo	nedifina artikolo	substantivo	adjektivo
nominativo	<i>une</i>	<i>fille</i>	<i>grande</i>
prepozitivo	<i>une</i>	<i>fille</i>	<i>grande</i>

Kiel supre, la paradigmo estas tutamplekse identa pro la prepozitiva strukturo de la deklinacio. Same estas ĉe la tabelo kun la difina artikolo:

kazo	difina artikolo	substantivo	adjektivo
nominativo	<i>la</i>	<i>fille</i>	<i>grande</i>
prepozitivo	<i>la</i>	<i>fille</i>	<i>grande</i>

Por turko montriĝas nun po dua nedifina kaj difina artikoloj, modifo de la adjektivo, postsubstantiva pozicio de la adjektivo kaj la tute fremda akordo inter la elementoj de la aldona sintagma.

Pro la simileco de la latinidaj lingvosistemoj, la **hispana** nun ekstervice pritraktiĝos, kun reduktitaj paradigmoj – la hispana siaflanke ankaŭ havas prepozitivan strukturon.

Ĉar la hispana adjektivo *grande* en la postsubstantiva pozicio estas identa en ambaŭ genroj, ni uzos provizore la adjektivon *hermoso / hermosa* (bela).

genro	nedifina artikolo	substantivo	adjektivo
vira	<i>un</i>	<i>muchacho</i>	<i>hermoso</i>
ina	<i>una</i>	<i>muchacha</i>	<i>hermosa</i>

genro	difina artikolo	substantivo	adjektivo
vira	<i>el</i>	<i>muchacho</i>	<i>hermoso</i>
ina	<i>la</i>	<i>muchacha</i>	<i>hermosa</i>

Ĉi tie videblas la tute simetria akordo de la laŭsistemaj hispanaj sintagmoj de la determinita substantivo. La ĝis nun pritrakitaj cel-lingvoj havas sintagman strukturon kun relative monotonaj paradigmoj. Kun la germana kaj la rusa tio ŝanĝiĝas. Ambaŭ lingvoj havas multe pli ampleksan fleksion kaj trigenran lingvosistemon kun subsistemoj kaj sistemrompoj.

Tamen ni klopodu rigardi la du lingvojn surbaze de la baza lingvosistemo, kiu estu propedeŭtike utila por ebligi inteligentan divenadon, parkerigadon kaj uzadon de la lingvo laŭ la percepto de *Chomsky*, ke oni povu per „limigita“ nombro da lingvaj elementoj formi senliman nombron da kompreneblaj frazoj – laŭ moderna vidpunkto komunika sed ne nepre gramatika lingvaĵo.

Daŭrigante laŭalfabete, ni okupiĝos nun pri la **germana**. La vicordo denove estas adjektivo antaŭ substantivo, kiel en la turka.

kazo	nedifina artikolo	adjektivo	substantivo
nominativo	<i>ein</i>	<i>großer</i>	<i>Junge</i>
genitivo	<i>eines</i>	<i>großen</i>	<i>Jungen</i>
dativo	<i>einem</i>	<i>großen</i>	<i>Jungen</i>
akuzativo	<i>einen</i>	<i>großen</i>	<i>Jungen</i>

Facile estas konstati, ke post la nedifina artikolo la adjektivo havas la t. n. „malfortan“ deklinacion kun la finaĵo *-en* en ĉiu kazo escepte la nominativon.

kazo	difina artikolo	adjektivo	substantivo
nominativo	<i>der</i>	<i>große</i>	<i>Junge</i>
genitivo	<i>des</i>	<i>großen</i>	<i>Jungen</i>
dativo	<i>dem</i>	<i>großen</i>	<i>Jungen</i>
akuzativo	<i>den</i>	<i>großen</i>	<i>Jungen</i>

Ankaŭ la paradigmo kun la difina artikolo konfirmas la skemon „malforta“ deklinacio de la adjektivo. Simile estas la neŭtra paradigmo.

kazo	nedifina artikolo	adjektivo	substantivo
nominativo	<i>ein</i>	<i>großes</i>	<i>Haus</i>
genitivo	<i>eines</i>	<i>großen</i>	<i>Hauses</i>
dativo	<i>einem</i>	<i>großen</i>	<i>Haus(e)</i>
akuzativo	<i>ein</i>	<i>großes</i>	<i>Haus</i>
lok./abl./instr.	<i>einem</i>	<i>großen</i>	<i>Haus(e)</i>

Pro la funkcikoncentriĝo de la dativo la lastaj tri paradigmeroj reduktiĝas al unu. Oni notu ke la akuzativo havas egalan formon kun la nominativo. Tio same validas por la sintagmo kun la difina artikolo.

kazo	difina artikolo	adjektivo	substantivo
nominativo	<i>das</i>	<i>große</i>	<i>Haus</i>
genitivo	<i>des</i>	<i>großen</i>	<i>Hauses</i>
dativo	<i>dem</i>	<i>großen</i>	<i>Haus(e)</i>
akuzativo	<i>das</i>	<i>große</i>	<i>Haus</i>
lok./abl./instr.	<i>dem</i>	<i>großen</i>	<i>Haus(e)</i>

La sintagmoj por la ina genro montras similaĵojn, sed havas malpli ampleksan paradigmon.

kazo	nedifina artikolo	adjektivo	substantivo
nominativo	<i>eine</i>	<i>große</i>	<i>Maid</i>
genitivo/dativo	<i>einer</i>	<i>großen</i>	<i>Maid</i>
akuzativo	<i>eine</i>	<i>große</i>	<i>Maid</i>
lok./abl./instr.	<i>einer</i>	<i>großen</i>	<i>Maid</i>

Nova funkcikoncentriĝo montriĝas en la formoj por genitivo kaj dativo, ebligante pluan redukton de la paradigmo. Ankaŭ ĉi tie nominativo = akuzativo.

kazo	difina artikolo	adjektivo	substantivo
nominativo	<i>die</i>	<i>große</i>	<i>Maid</i>
genitivo/dativo	<i>der</i>	<i>großen</i>	<i>Maid</i>
akuzativo	<i>die</i>	<i>große</i>	<i>Maid</i>
lok./abl./instr.	<i>der</i>	<i>großen</i>	<i>Maid</i>

La vorto „*Maid*“ elektiĝis ĉi tie por „knabino“, kvankam ĝi estas iom arkaika kaj krome iom similsenca kiel „virgulino“, pro tio ke la pli nuntempa vorto „*Mädchen*“ estas laŭforme diminutivo kaj tial neŭtra substantivo.

Tio substrekas, ke la genro en la germana estas ĉefe gramatika kaj altgrade sendependa de la biologa. Ankaŭ objektoj povas havi ĉiun el la tri genroj (vd. tie) kaj submetiĝas al la gramatika deklinacio sen rilato kun la biologa genro.

En la **rusa** lingvo mankas ambaŭ artikoloj. Tio unuflanke estas avantaĝo por la turko, kiu ne devas okupiĝi pri plurformaj artikoloj, ĉu difinaj aŭ nedifinaj. Aliaflanke necesas konsideri la formojn de la adjektivo en aparte fleksia lingvo. Krome, simile kiel en la germana, genro gramatika kaj biologia ludas tre grandan rolon. Jen virgenra ekzemplo:

kazo	adjektivo	substantivo
nominativo	большой	мальчик (knabo)
genitivo	большого	мальчика
dativo	большому	мальчику
akuzativo	большого	мальчика
lokativo/prepozicia	большом	мальчике
instrumentalo	большим	мальчиком

Konstateble necesos lerni ses kazajn formoj kun po kvin adjektivajn kaj substantivajn finaĵojn. Ingenra ekzemplo havas similan amplekson:

kazo	adjektivo	substantivo
nominativo	большая	девушка (knabino)
genitivo	большой	девушки
dativo	большой	девушке
akuzativo	большую	девушку
lokativo/prepozicia	большой	девушке
instrumentalo	большой	девушкой

La ingenra deklinacio havas kvin substantivajn sed nur tri adjektivajn finaĵojn. Fine, la ekzemplo el la neŭtra genro:

kazo	adjektivo	substantivo
nominativo	большое	место (loko)
genitivo	большого	места
dativo	большому	месту
akuzativo	большое	место
lokativo/prepozicia	большом	месте
instrumentalo	большим	местом

Kiel la vira, la neŭtra deklinacio havas po kvin adjektivajn kaj substantivajn finaĵojn. Apartaĵo de la vira deklinacio estas la traktado de substantivoj kiuj nomas objekton. Oni atentu la akuzativon:

kazo	adjektivo	substantivo
nominativo	большой	грузовик (kamiono)
genitivo	большого	грузовика
dativo	большому	грузовику
akuzativo	большой	грузовик
lokativo/prepozicia	большом	грузовике
instrumentalo	большим	грузовиком

La egalaj formoj de la nominativo kaj akuzativo akordas kun la sama fenomeno en la neŭtragenra deklinacio.

Ni revenos al la simpla determinita substantivo en la kadro de la numeraloj, kiuj kaŭzas jen pli ampleksan, jen malpli ampleksan paradigmon, depende de la lingvo pritraktata.

Kvanta morfologia analizo de la simpla determinita substantivo

La simpla determinita substantivo estas sintagmo konsistanta el artikolo (se ekzistanta), unu adjektivo kaj substantivo. Ni konstatas, ke la morfologia amplekso estas tre diversa laŭ genro, nombro kaj kazo en la artikolo, adjektivo (epiteta) kaj substantivo.

Turka	nedif. art.	dif. artikolo	adjektivo	substantivo	
genro	-	-	-	-	
nombro	-	-	-	2	
kazo	-	-	-	5	7

Angla	nedif. art.	dif. artikolo	adjektivo	substantivo		Faktoro:
genro	-	-	4	6		
nombro	-	-	-	5		
kazo	-	-	-	2	17	10

Esperanta	nedif. art.	dif. artikolo	adjektivo	substantivo		Faktoro:
genro	-	-	-	3		
nombro	-	-	1	1		
kazo	-	-	1	1	7	0

Franca	nedif. art.	dif. artikolo	adjektivo	substantivo		
genro	2	3	2	10		
nombro	1	1	2	4		Faktoro:
kazo	-	-	-	-	25	18

Germana	nedif. art.	dif. artikolo	adjektivo	substantivo		
genro	2	3	1	9		
nombro	1	2	2	8		Faktoro:
kazo	5	5	5	5	48	41

Hispana	nedif. art.	dif. artikolo	adjektivo	substantivo		
genro	2	2	2	8		
nombro	2	2	2	3		Faktoro:
kazo	-	-	-	-	23	16

Rusa	nedif. art.	dif. artikolo	adjektivo	substantivo		
genro	-	-	3	11		
nombro	-	-	6	6		Faktoro:
kazo	-	-	6	6	38	31

Rango	Lingvo	Faktoro
1	Esperanto	0
2	Angla	10
3	Hispana	16
4	Franca	18
5	Rusa	31
6	Germana	41

La kvanta morfologia analizo montras, ke Esperanto starigas por turkoj definitive la plej malmultajn obstaklojn ĉe la simpla determinita substantivo, klare postlasante la anglan, hispanan kaj francan. La rusa kaj germana estas same evidente la plej obstakloriĉaj.

Adreso de la aŭtoro

Gerald TUCKER

Breitenbergstrasse 7

DE 86163 Augsburg / GERMANIO

<g.tucker@gmx.de>

Priaŭtoro informo

Gepatra lingvo: usona/angla. Lernis la turkan en universitato. Ekde 1972 fakestro por ekzamenoj de Germana Esperanto-Instituto.

Raporto

Astronomiaj staĝoj de ISAE-fakgrupo

Laŭ la Jarlibro de UEA en Esperantio multas diversaj fakaj grupoj, organizoj, asocioj... Tradicie kunligas tiujn fakgrupojn celoj – uzi Esperanton inter fakuloj kaj propagandi la fakon inter esperantistoj. La celoj estas tute naturaj kaj tute noblaj, la problemo nur – kiel ilin atingi. Se la organizo ne estas formala (sed reale funkcia), kutime ĝi aperigas sian revueton aŭ informbultenon, posedas TTT-paĝojn en la reto, organizas kunvenojn de siaj anoj. Ekfunkciigi fakgrupon ne estas facila tasko – kolekti samfakulojn, ellabori kaj regule ĝisdatigi informojn en la TTTejo, eldoni fakgrupan periodaĵon...

Bedaŭrinde tamen, la agado de iu faka grupo ofte dependas de unu sola persono – ĝia motoro. Tute alie aspektas la vivo de grupo, kiam ĝi enhavas teamon de aktivemuloj. Se ni laŭ tiu vidpunkto kompilos liston de la faka agado en Esperantio, tiam nia listo tute aliaspektos ol la listo en la Jarlibro de UEA.

Unu el tiuj fakgrupoj, kiuj baziĝas en sia funkcio ne sur la decidoj de unu persono, sed sur agado de teamo, estas grupo de astronomiaj ŝatantoj. La grupo estis fondita kaj anoncita en la Universala Kongreso en Tel-Avivo en 2000. Ĝia unuavica agado estis tute virtuala, membroj interrete interkomunikiĝis, interrete faris unuan komunan projekton – ellaborado de astronomia vortaro, kiu ĝis nun ne perdis sian aktualecon, publikigis artikolojn pri temoj rilataj al ĉielobservado, al astraj objektoj ktp. Tiuj artikoloj tuj puŝis la ideon eldonado de Astronomia Almanako, iuspeca revuo-broŝuro, kie krom amaso da artikoloj troviĝis Astronomia Kalendaro – utila informilo, kiu indikis pri ĉiutaga ĉielevento, kiu ne bezonis iujn specialajn ilojn por observado. Tamen la unua serioza paŝo el la virtuala mondo al la reala estis la starto de specialaj staĝoj por ĉiu esperantisto interesiganta pri Astronomio. La profiteco de la fako helpas kunligi homojn kun tute diversaj interesoj – amatorajn ĉielobservantojn, ŝatantojn fotumadi, interesigantojn pri fiziko, ĥemio, matematiko, historio...

La unuaj tri staĝoj okazis en diversaj partoj de Francio. Ilin gvidis denaska esperantisto kaj sperta fakulo, *Patrick Lagrange*. La 4^a astronomia staĝo sukcese okazis en la vilaĝo *Blera*, Italio. Jam nun eblas inviti al plua sekva de esperantistoj ŝatantoj de astronomio. Loko kaj tempo estos anoncitaj iom poste. Al ĉiuj legantoj de tiu ĉi revuo laŭeble ĉiam plej klaran ĉielon dum nova staĝo de la astronomia faksekcio de ISAE!

Alexander Mikishev

Kunordiganto de Astronomia Sekcio de ISAE

<alex@amiks.biz>